

# ESPERANTO

## ★ TRIUMFONTO ★

Publikigilo de multaj gravaj esperantistaj organizajoj.

Aperas semajne. Senpagaj monataj aldonoj: „Internacia Komercio“ kaj „Revuo“ (literatura, popolscienca).

Protoktiantoj:

D-o Leono Zamenhof, Warszawa  
W.M. Page, advokato, Edinburgh  
Ernest Archdeacon, Parizo  
I. Gili-Norta, komercisto, Barcelona

H. Fischer, grandindustriisto, București  
Frans Schoofs, Antwerpen  
P. v. Medem, bank-kaj fabrikkonduktoro, Kaunas.

**N-o 211**  
**28. 9. 1924**

Redakcio:  
Cefredaktoro: Teo Jung.  
Redaktoro: Robert Kreuz.  
Redakciaj kunlaborantoj:  
H. Jung kaj M. Buttin, L. K.

Abonprezo  
po numero egalvaloro de 0,05 dolaro  
aŭ 0,30 sv. fl., por landoj, kies valuto  
sufiĉe maksimume 50%; por ĉiuj aliaj  
landoj 0,05 dol. aŭ 0,35 sv. fl.

Administracio:  
Horrem b. Köln, Germanlando

Anonprezo  
po kvadrata-centimetro egalvaloro de  
0,20 sv. fl. (ĉe antaŭa pago 0,15 sv. fl.),  
es. „Internacia Komercio“ la duoblo.

Antwerpen, Barcelona, București, Edinburgh, Horrem, Kaunas, Paris, Warszawa

## Grava decido de la Ligo de Nacioj.

Novaj korporacioj por Esperanto.

### Grava decido de la Ligo de Nacioj.

La Ligo de Nacioj laŭ diversaj proponoj jam kelkfoje okupis sin pri Esperanto. Konata estas ĝia rekomendo de Esperanto. La propono rekomendi la enkondukon de Esperanto al la ŝtatoj apartenantaj al la Ligo de Nacioj siatempe estis transdonata al la Intelektala Komisiono de la Ligo. La komisiono kontraŭstaris al la propono kiel ĝenerale al artefarita helpa lingvo kaj rekomendis la lernadon de vivantaj lingvoj. La Plena Kunsido de la L. d. N. jam ne konfirmis la decidon de la Int. Komisiono. Sekve de tio restis la siatempa rekomendo de Esperanto esprimita per akcepto de la raporto pri Esperanto de la vic-ĝen. sekr. D-o Niobé en la III. kunveno de L. d. N. de 12-14 sept. 1922. (Komparu la oficialan „Journal“ L. d. N. n-oj 10 kaj 11, sept. 1922).

Pro tio, ke kontraŭuloj de Esperanto disvastigis la sciigon, ke la Ligo de Nacioj malakceptis Esperanton, ni fiksis tie ĉi ankoraŭfoje la historiajn faktojn.

Nun la Ligo de Nacioj denove okupis sin pri Esperanto.

Subtenite de la delegitoj nederlanda, ĥina, japana kaj persa, la 20 septembro 1924, la Dua Komisiono de la L. d. N. akceptis kun 13 kontraŭ 10 voĉoj la jenan rekomendon al la Plena Kunsido de la Ligo:

„La Ligo de Nacioj rekomendas al la ŝtatoj, membroj de la Ligo, ke ili konsentu al Esperanto la traktadon kaj tarifon de klara lingvo en la telegrafa kaj radiotelegrafa servado kiel praktika helpa lingvo de la internaciaj interkomunikoj flanke de la naciaj lingvoj uzataj.“

Ni ĵus ricevis telegramon el Genève, dirantan ke la Plena Kunsido de la Ligo akceptis tiun ĉi proponon.

Oni devas gratuli la ŝtatdelegitojn pro tiu larĝvida decido. Estas sendube, ke tiu rekomendo al la ŝtatoj apartenantaj al la L. d. N. senteble influos en estonto la sintenadon de postkaj telegrafinstiucioj al Esperanto.

La rezolucio en sia formo reprezentas oficialan rekonon de Esperanto per la Ligo de Nacioj.

Ne estas dubebla, ke tiu ĉi sukceso ni ŝuldas unue al la senlaca laboro de nia altŝatata pioniro s-o D-o Privat kiu senĉese klopodis kaj penadis ĉe la rondoj de la Ligo de Nacioj, malgraŭ longdaŭraj malhelpoj kaj malfacilaĵoj ofte konsideritaj kiel apenaŭ superheblaj.

Ni kredas paroli en la nomo de la tuta esperantistaro, se ni esprimas tie ĉi al s-o D-o Privat nian sinceran dankon kaj koran gratulon pro tiu sukceshaviganta laboro.

Robert Kreuz.

### Bordeaux.

#### La urbo kaj ĝiaj vinoj.

Veru rimarkinda estas la geografia situo de Bordeaux, je la kruciĝo de grandaj naturaj kaj historiaj vojoj de Franclando kaj de Okcidenta Eŭropo: surtera vojo de Rejno al Pirineoj, rivera vojo de la Mediteraneo al la Oceano laŭ la valo de Garonne, mara vojo sur la Oceano en ĉiuj direktoj, al Britlando kaj la nordaj maroj de Eŭropo, al Afriko kaj Ameriko.

Se ni rimarkas aliparte, ke tie la rivero formas naturan kurban rodon, en formo de kvaronluno, ni ne miras, se tie naskiĝis granda haveno kaj

granda urbo, kiu ĉiam estis la ĉefurbo de Sudokcidenta Franclando.

Sajnas ke jam antaŭ Kristo tie ekzistis komercloko. Sed nur sub la estreco de la romanoj formiĝis granda urbo. El la multaj monumentoj de tiu epoko restas nur la ruinoj de cirko nomata Galla Palaco.

Post diversaj invadoj, kiuj malhelpis la pli-grandigon de Bordeaux, la edziĝino de Aliénor d' Aquitaine kun la angia reĝo Henriko II. alportis al tiu princo grandan parton de Franclando, kies ĉefa urbo estis Bordeaux: ĝi konis grandan prosperon dum la estreco de la angloj, kiu daŭris tri jarcentojn.

Inter la monumentoj de la Meza Epoko estas cifindaj precipe la preĝejoj, St. Croix, St. Michel, St. Seurin, la katedralo St. André kaj la restaĵoj de la malnova urbdomo, nomata „Grosse Cloche“ (Granda sonorilego).

Post malbona periodo pro la religiaj militoj, Bordeaux denove vidis, dum la 18. jarcento sian

ebligas, ke la ŝipoj portantaj la karbon de Britlando reforiras kun ŝarĝo de fostoĵoj por la anglaj minejoj; sekve tiuj ŝipoj vojaĝas en kondiĉoj speciale malmultkostaj.

Lokita je 98 kilometroj de la Oceano, apud rivero, kie sentiĝas la marmovo, je la fino de unu el la plej riĉaj valoj de Franclando, Bordeaux prezentas la avantaĝojn de la internaj havenoj.

Regulaj ŝipaj vojaĝoj ligas Bordeaux kun la ĉefaj havenoj de Ameriko, precipe de Suda Ameriko. La Gironde-a haveno havas ankaŭ oftajn rilatojn kun la francaj kolonioj de Afriko, eĉ kun Ekstrema Oriento kaj Oceanio. Ĝi enhavas 9600 metrojn da kajoj, sur kiuj troviĝas 254 gruoj povantaj levi ĝis 250 milkilogramoj, kaj 180 kilometroj da fervojoj.

La komercio de Bordeaux, kiu dum la lastaj jaroj iom suferis pro la ĝenerala krizo, forte revigligis en 1923 kaj altigis en tiu jaro je 4822000 tunoj: tiu cifero lokigas la sudokcidentan havenon en la kvaran rangon en Franclando.

Ni parolis jam pri la industrio de Bordeaux, kaj pri la komercio de karboj kaj minfostoĵoj. Ni devas nun diri kelkajn vortojn pri la plej konata komercio de tiu haveno, nome la komercio de vinoj. Ni diru tuj, ke Franclando estas, pri la kvanto de vinoj produktataj, la unua lando en la mondo. Tion montras la jenaj ciferoj:

Meza jara produkto:	
Franclando	52 milionoj hkl.
Algerio	8
Italujo	55
Hispanujo	25
Portugalujo	4½
Argentina Respubliko	4½
Greklando	2

La vino estas rikolta en multaj regionoj de Franclando. Rilate al la kvanto, la sudaj departementoj ludas la ĉefan rolon. Sed, pri la kvalito, kun Gironde estas nur komparindaj Bourgogne kaj Champagne, en tiu lasta estas produktataj ŝaŭmantaj vinoj famaj en la tuta mondo.


Sed Gironde estas la departemento plej konata pri la kvalito de siaj vinoj, kaj ĝia produktado estas la plej diversa, tiel pri la blankaj vinoj kiel pri la ruĝaj.

El la ruĝaj la plej ŝatataj estas tiuj de la regionoj nomataj „Médoc“, „Graves“, „St. Emilion“. Estas malfacile diri kiuj estas la plej ŝatindaj: el Médoc venas produktoj pli delikataj, el St. Emilion pli plenaj; oni povus longe kaj vane diskuti, ĉiu juĝas laŭ sia persona gusto.

La landparto nomata Médoc troviĝas nordokcidente de Bordeaux, inter la rivero kaj la Oceano. La vinberoj kiuj portas la grandajn vinojn de Médoc kreskas precipe apud Margaux kaj Pauillac. Tie oni trovas la fame konatajn vinberojn de Château Lafite, Château Margaux, Château Latour, kiuj laŭ la oficiala klasigo estas la tri unuaj en tiu landparto; sed kiom da bonegaj produktoj estas ankaŭ cindindaj!

St. Emilion, sur monteto, estas tiel konata pro sia pentrinda aspekto kaj siaj historiaj restaĵoj kiel pro siaj bonegaj vinoj. Ankaŭ famaj estas, tute proksime de tie, la vinberoj de Pomerol kies produktoj havas kvalitojn mezajn inter tiuj de Médoc kaj St. Emilion.

La regiono „Graves“ troviĝas okcidente, sude kaj sudoriente de Bordeaux, ne malproksime de Garonne. En ĝi troviĝas la vinberoj de Haut-



Bildo de la haveno de Bordeaux.

(Kiliso atable disponigita de la Presio F. Pech, Bordeaux.)

komercon brile pli grandigi. La urbo samtempe multe pli grandigis kaj pli beligis. La pibeligo estas precipe ŝuldira al la provincoj Boucher, Tourny, Dupré de St. Maur. Ili unue kreis „fasadon“ sur la rivero: anstataŭ la diversaj kaj malbelaj antiaŭaj konstruaĵoj, ili starigis belajn samaspektajn domojn, kiuj formas iuton de impona aspekto; kaj en tiu fasado ili malfermis belan placon unustilan, kie troviĝas la admirindaj Palacoj de la Borso kaj de la Dogano. Al ili ankaŭ oni ŝuldas la larĝajn vojojn de la centro, la Publikan Gardenon kaj la Grandan Teatron, ĉefverkon de rimarkinde pura stilo de la fama arkitekto Louis.

Ankaŭ en tiu epoko estis konstruata la urbdomo. El la kreaĵoj de la posta periodo estas cifindaj la Ŝtona Ponto kaj la vasta placo nomata „Quinconces“.

Antaŭ ol paroli speciale pri la komercio, ni devas rimarki, ke Bordeaux estas ankaŭ urbo de industrioj tre diversaj kaj gravaj: metalaj (konstruo de ŝipoj, tramveturiloj, vagonoj), konstrual, kemial, elektraj, nutraĵaj (konservaĵoj, oleofabrikejoj), kiuj kune okupas almenaŭ 50000 laboristojn.

Por tiuj industrioj kaj la aliaj de la regiono la Bordeaux-a haveno ricevas multe da karbo; speciala privilegio estas, ke ĝi troviĝas je la eliro de la granda sudokcidenta pina arbaro: tio

Brion, komparinda kun la plej bonaj de Meŝoc. La landpartoj jam nomitaj produktas precipe ruĝajn vinojn; inter la blankaj, la plej famaj en Gironda, kaj eble en la tuta mondo, venas de la regiono „Sauternes“ en la sudorienta parto de la departemento; la unua estas „Château-Yquem“ kies nomo estas universale konata. La Bordeaux-anoj estas fieraj pri sia vino, glora produkto de ilia tero kaj de iliaj zorgoj. P. Marly, vicdel. de UEA, Bordeaux.

## Societo Franca por la propagando de Esperanto (S. F. P. E.)

La Societo Franca por la Propagando de Esperanto (fondita en 1898) kun nun 70 grupoj en 13 regionaj federacioj elektis en la honoran komitaton jenajn francajn eminentulojn:

1. S-o Herriot, Prezidanto de la Konsilantaro de Ministroj;
2. S-o Baladier, Ministro de Kolonioj;
3. S-o Dalbier, Ministro de la liberigitaj regionoj;
4. S-o Justin Godart, Ministro de Laboro (jam delonge honora membro de UEA);
5. S-o Appel, Rektoro de la Parisa Universitato, membro de la Scienca Akademio;
6. S-o Painlevé, Prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj, membro de la Scienca Akademio;
7. S-o Lumière, membro de la Scienca Akademio, unu el la eltrovintoj de kinematografio;
8. S-o Pascalis, prezidinto de la Parisa Komerca Ĉambro.

Por informi nian legantaron pri la kariero de s-o Painlevé ni represas ĉi-tie mallongan priskribon de lia vivo.

### Paul Painlevé.

~Sinjoro Paul Painlevé estas kun Henri Poincaré, kies disĉiplo li estas, unu el la plej konataj kaj famaj francaj matematikistoj.

Kiel filo de litografa laboristo, li naskiĝis en Parizo la 5 decembro 1863 kaj studis en unuagrada popola lernejo. Tie la instruisto rimarkis lian esceptan inteligentecon kaj dank' al li la juna Painlevé eniris liceon. Tie li estis brila lerninto suprizanta ĉiun pri siaj matematikaj eltrovaĵoj.

Post studoj en Supera Normala Lernejo (plej alia pedagogia lernejo en Francujo), je la aĝo de 23 jaroj, li fariĝis profesoro en la scienca fakultato de la Lille-a Universitato. En 1887, s-o Painlevé fariĝis doktoro de matematikaj sciencoj, kaj je la aĝo de 30 jaroj kursgvidanto en la Parisa Universitato. Lia reputacio fariĝis internacia. En 1895, la juna scienculo estas invitita en la Universitaton de Stockholm, kie li instruis la analizon. Li publikigis mondkonatajn librojn: „Lecionoj pri integrado de ekvacioj de la mekaniko“, „Lecionoj pri la frotado“, „Lecionoj pri la teorio de diferencaj ekvacioj“. Lia triumfo, skribis s-o Poincaré, estis unu el la plej belaj de la franca scienco.

Painlevé estis pioniro de aviado. Li ĉestis la unuajn flugprovojn en Ayyours kaj tuj kom-

prenis la estontecon de aviado. Li estis la unua pasaĝero de la amerikano Wrigh kaj flugis kun li 70 minutojn, li estis same la unua pasaĝero de Henry Farman en Mourmelon. En tiu epoko li skribis du famajn librojn: „Organizo de la aera navigado en Francujo“ kaj „Aviado“.

En 1910, la Franca Akademio de Sciencoj malfermis al li la pordojn. Painlevé fariĝis profesoro en la Parisa Politeknika Lernejo kaj poste prezidanto de la teknika komisiono de la nacia laboratorio de eksperimentoj.

Altrita al la politiko, Painlevé estis elektita en 1910 socialista respublikana deputito en la Ĉambro de Deputitoj, fariĝis en 1917 Prezidanto de la konsilantaro de ministroj kaj, en junio 1920, Prezidanto de la Ĉambro de Deputitoj.

S-o Painlevé estas malnova amiko de nia movado, kiun li apogis antaŭ la milito, en 1914; li devis fari la malferman paroladon de la Deka. En majo 1923, Painlevé faris paroladon en la bankedo de la Esperanto Federacio de la Parisa Regiono, kaj nun li akceptis la titolon de honora membro de la Franca Societo por la Propagando de Esperanto.

## Tekstoj kaj komentarioj.

Antaŭ la deputitbalotoj okazintaj la 11 majo 1924 la Grupo Esperantista de Lyon (G.E.L.) adresis al ĉiuj kandidatoj de la departemento Rhône klarigan leteron kun la jena demando:

1. Ĉu vi estas favora al Esperanto?
2. Ĉu vi deziras, ke oni nuligu la cirkuleron Léon Bérard pri Esperanto?
3. Ĉu vi aprobus eksperimenton pri instruado de Esperanto en lernejoj?



S-o Herriot



S-o Painlevé



S-o Godart

Por konatigi niajn legantojn kun la tri francaj ministroj, nomitaj en la informo de S. F. P. E., ni reproduktas tie ĉi iliajn bildojn.

Alvenis 27 respondoj, ĝenerale favoraj. Inter la 13 balotitaj deputitoj (ĉiuj de la „maldekstra bloko“), 8 respondis „jes“ al la tri demandoj (s-oj Moutet, J. Godart, Rognon, Bender, Lambert, Breton, Vermare, Fillon); 1 respondis „jes“ al la unua kaj al la tria demando kaj „ekzamenota“ al la dua (s-o Fèvre); 3 respondis favore, sed pli malpli precize (s-oj Herriot, Chazette, Gerboud); 1 ne respondis (s-o Darne).

La respondo de s-o Herriot (laŭvorte tradukita) estas: „Mi bone ricevis vian leteron de 2 majo, per kiu vi petas mian opinion pri la instruado de Esperanto. Mi havas honoron konigi al vi, ke mi vidas nur profitojn ĉe kreo de internacia lingvo.“ Do al precizaj demandoj pri Esperanto li tiam respondis nur per deziro al „kreo de internacia lingvo“...

Fine de junio, laŭ instigo de la Societo Franca por la Propagando de Esperanto (S.F.P.E.), la G. E. Lyon sin turnis al diversaj eminentuloj, petante ke ili fariĝu patronantoj de la loka grupo (fondita en 1902) kaj de la nacia societo. Ĝis nun favore respondis s-o Louis Lumière, s-o Justin Godart kaj s-o Edouard Herriot.

(Laŭvorta traduko)

Paris, la 18 julio 1924.

La Prezidanto de l' Ministraro, Ministro de la Eksterlandaj Aferoj, al Sinjoro Ministro de l' Laboro, de l' Publika Sano kaj de l' Socia Aniaŭzorgo.

Vi bonvolis transdoni al mi, petante ke mi ĝin favore akceptu, altpeton de la G.E.L., kiu deziras mian petronecon favore al sia klopodado.

Mi rapidas konigi al vi, ke mi tre volonte akceptas la titolojn de Honora Membro, kiuj estas al mi proponataj de la G.E.L. kaj de la S.F.P.E.

Mi estas feliĉa vin informi pri tio.

Anstataŭ la Prezidanto de l' Ministraro kaj laŭ permeso,

la Direktoro de la persona Sekretariaro (Subskribe:) Mandon.

(Manskribe:) Miajn plej korajn sentojn! (Subskribe:) J. Godart.

S-o Godart, jam de pli ol 12 jaroj, estas honora membro de U.E.A. En 1907 li subtenis la proponon Lucien Cornet ĉe la Deputitaro kaj li fariĝis prezidanto de la Parlamenta Esperantista Grupo. Dum la milito ŝtata subsekretario de la armea sanitara servo, s-o Godart organizis, per cirkulero je la 20 majo 1916, disdonon de lernolibretoj „Esperanto kaj Ruĝa Kruco“ al la kuracistoj kaj geflegistoj. Li klopodis, por ke la Internacia Labor-Oficejo oficiale uzu Esperanton. Antaŭ du jaroj li persone protestis al s-o Léon Bérard kontraŭ lia cirkulero pri Esperanto. La 25 februaro 1924 li prezidis la ferman kunvenon de la „Semajno de U.E.A.“ en Lyon. S-o Justin Godart nun estas ministro de l' Laboro kaj de l' Publik Sano.

Al la peto de la G.E.L. s-o Godart tuj jese respondis kaj promesis klopodi, ke s-o Herriot faru same. Per la ĉi-supra teksto oni povas konstati, ke li sukcesis.

Mi malĝoje spertis, ke inter alilandaj esperantistoj disfamiĝas, ke la nuna registaro de Francando „promesis nuligi la faman cirkuleron Léon Bérard“. Niaj propagandistoj estu tre singardemaj antaŭ ol publikigi ion similan kaj kondukti „ĉiam ankoraŭ kun granda prudento“. Mi speciale admonas la nefrancajn esperantistojn, ke ili ne

## Radio bezonas lingvon internacian.

De D-o Pierre Corret,

vic-prezidanto de la „Franca Societo por Studo de Radiotelegrafio kaj Radiotelefonio“,

sekretario de la „Provizora Komitato por Starigo de Internacia Amatora Radio-Unio“,

prezidanto de la „Franca Komitato por Transatlantika Radio-Provo“.

Por konfirmi al multaj deziroj de nia legantaro koncerne uzebiliton de tiu lingvo en Esperanto kaj Radio ni represas tie ĉi kun danko al la eminenta aŭtoro detalan artikolon pri tiu temo, kvankam nia ĝenerala tendenco ne estas la poresparta propagando.

La artikolo tre taŭgas por traduko naciilingven. Ni petas ĉiun tradukinton de tiu artikolo bonvole sendi po. 1 ekzemplero de la koncerna gazeto al s-o D-o Pierre Corret, 97, rue Royale, Versailles, samtempe sciigante al nia redakcio la necesajn detalojn por „Kroniko“.

Internacia estas la kodo Morse, uzata por kunfadena aŭ senfadena telegrafio. Tial estas facile por ĉiu telegrafisto ricevi telegramon en lingvo, kiun li ne konas. La aparato kvazaŭ „diktas“ al li unu literon post alia. Li nur devas skribi ilin unuope dum la ricevado, sen la bezono kompreni la sencan de la vortoj kaj frazoj, kiujn li skribas. La diverseco de la lingvoj do ne estas tre ĝena barilo por telegrafio, se nur la telegrafisto devas skribi aŭtomate telegramojn, ne destinitajn por li mem.

Sed tute ne same estas, kiam li devas forlasi tiun maŝinan rolon kaj rekte interrilati kun sia korespondanto. Se ambaŭ telegrafistoj ne konas unu saman lingvon, tiam estas por ili neeble interkompreniĝi! Kaj tio okazas sufiĉe ofte ĉe radio-komunikado; ĉiunomente radiotelegrafisto ja povas ekriti mal malsamlingva telegrafisto.

Por plifaciligi la internaciajn komunikojn, la radiotelegrafia konferenco de Londono akceptis kvardek da interkonsentitaj litergrupoj, komenciĝantaj per „Q“, por doni al peti informojn pri la servado, plej ofte inter ŝipaj stacioj. QRA? signifas: „Kiu estas la nomo de via stacio?“; QRD: „Kien vi iras?“; QRF?: „De kie vi venas?“; QRG?: „Kiel vi ricevas miajn signalojn?“; QRX: „Ĉu mi devas atendi?“; ktp.

Ankaŭ ekzistas ĉe la maristaro „internacia kodo de signaloj“, por interŝanĝi lajn antaŭdifinitajn frazojn. DAY signifas: „Mi foresitis“; QMP: „Kio okazis?“; DQG: „Kion vi konsilas?“; KWF: „Sendu priskribon!“; QOH: „Mi ricevis vian leteron!“; QOY: „Ĉu vi bone faris?“; PCT: „Mi estas malsana“; TMV: „Kiam vi volos“...

Sed liaj rimedoj tute ne sufiĉas, kiam estas necese telegrafi alian, krom la antaŭdifinitaj frazoj, aŭ kiam la telegrafistoj ne havas komunan lingvon. Jen estas, ekzemple, tio, kion skribis al mi antaŭ kelkaj monatoj iu brita radiotelegrafisto, kies lingvo tamen apartenas al la plej disvastigitaj:

„Tre malmultaj stacioj Anglaj aŭ Amerikaj povas kompreni ian alian lingvon, krom la Angla, kaj sekve ŝipoj Francaj aŭ Italaj ofte havas malfacilaĵojn kun tiuj stacioj. Mi mem spertis tion dum vojaĝo al Argentino. Tiam mi estis sur la Angla ŝipo „Dennistoun“. Ni estis veturantaj ĝis Buenos-Aires. Renkontante nekonektan ŝipon, mi vokis ĝin, demandante: „QRA?“ (Kiu estas la nomo de via stacio?) Ĝi respondis: „QRA ŝipo Argentina „Asturia“. Mi tiam sendis: QRD? QRF? (Kien vi iras? De kie vi venas?) Ĝi respondis: „QRD Cadix QRF Montevideo“. Mi donis la scigon al la ŝipestro, kiu diris: „Demandu ĝin, kiam veteron ĝi havis de Montevideo“. Jen la malfacilaĵo! Mi ne povis paroli la Hispanan, tial mi sendis Angle: „Kian veteron vi havis?“ Ĝi respondis ion Hispana, kion mi ne povis kompreni. Nia tria oficiro sciis lomele la Francan kaj li tradukis la frazon Francan. Mi sendis ĝin al la „Asturia“. La respondo venis kiel antaŭe. Ĝi tute ne povis kompreni mian demandon. Mi sendis Esperante, sed la rezultato estis sama. Estis neeble datriĝi la interparoladon...“

Kiel oni scias, eksperimentoj por transatlantika radiosenado estas nuntempe farataj per mallongaj ondoj. Tre grandajn travojn oni spertis: Eŭropaj kaj Amerikaj amatoroj sukcesis efektiviĝi ambaŭflankajn komunikojn per ondoj longaj 200, 100, eĉ nur 75 metrojn, kun poenco kompare tre malgranda. Eksperimentante 200 metrajn ondojn ĉe nia propra sendostacio 8AE, mi iam ekritalis kun la Brita stacio 2OD. Bedaŭrinde, la posedanto de 2OD, kiu estas tre lerta eksperimentisto, tute ne scias la Francan lingvon, kaj mi mem estas tute ne kapabla uzi la Anglan. Post malfacila interŝanĝo de kelkaj frazoj Angle kaj France, pli malpli ĝuste komprenitaj ambaŭflanke, la stacio 2OD fine sciigis min, ke ĝi ne volas pli longe perdiĝi mian tempojn, kaj tiel ne povis efektiviĝi la interŝaj eksperimentoj, kiujn sen lingva barilo ni povus fari.

Sur la tuta amplekso de sia vasta teritorio, kie estas parolata nur unu sama lingvo, la Usonaj amatoroj transsendas relacise telegramojn ĝis tre malproksimaj lokoj. En Eŭropo tute malsama estas la afero. La travojo de eĉ ne tre potenca stacio atingas multajn malsamlingvajn landojn. Kiel tre ĝuste rimarkigis s-o H. A. Epton en „Wireless World“, al amatoroj, kiuj kun unu lando volos korespondadi, sufiĉos lerni la lingvon de tiu lando

(kvankam longa kaj malfacila estas la lernado de tiu lingvo), sed por tiuj, kiuj volos ekritali kun diversaj landoj, nome Danujo, Nederlando, Ĉeĥo-Slovakujo, Germanujo, Hispanujo, ktp., estos necese trovi ian alian solvon, kiu ne estu la lernado de diversaj lingvoj.

Se la diverseco de la lingvoj estas nur kompare ĝena ĉe radiotelegrafio, ĉar tuj kompreno ne ĉiam estas necesa, tute malsama okazas ĉe radiotelefonio. Telefonio komunikado ne tuj komprenata de iu homo mem, kiu ĝin aŭdas, maltrafas sian celon kaj estas tute perdita.

Ekzistas nun en la pli multaj landoj radiotelefonistoj nomo „brodkastistoj“, kiuj transsendas ne sole koncertojn, sed ankaŭ paroladojn kaj diversajn komunikadojn, ĉiu en sia propra nacia lingvo.

Tiuj koncertoj kaj komunikadoj estas aŭdataj tre malproksime trans la limoj de ĉiu lando, kaj, se muziko estas internacie ĝuebla, malsame estas pri paroladoj, kiu; estas nekompreneblaj por la pli granda nombro da aŭdatantoj.

Eĉ muziko bezonas lingvon internacian! Kiam Granda Britujo ankoraŭ ne posedis ian radiotelefonian stacion kaj la Britaj amatoroj aŭskultadis fremdajn koncertojn, kelkaj el ili iam skribis al mi, demandante, ĉu ne estus eble, ke la stacio de la Eiffel-turo elparolu „ankaŭ Angle“ la titolojn de siaj muzikpecoj. Tia solvo sendube kontentigus la Britajn amatorojn, sed neniel ĝi utilis por la Hispanaj, Italaj aŭ Ĉeĥo-Slovakaj, kiuj ankaŭ aŭskultas la koncertojn.

Nebezone estas longe insisti, por komprenigi, ke komunikadoj radiotelefone transsendataj per naciaj lingvoj estas kompreneblaj nur de malgranda parto el la aŭdatantoj, kaj tre prave s-o Hugh S. Pocock, ĉefredaktoro de „Wireless World“, nomis Esperanton „la ŝlosilo de la monda brodkasto“. Kiom malmulte da francaj amatoroj, ekzemple, kiuj, laŭ la nuntempa ŝtato, aŭdas la Britojn, estas kapablaj kompreni la paroladon transsendatitan de la stacio de la „British Broadcasting Company“? Kiom ankaŭ da Britaj amatoroj komprenas la Francan sendaĵojn?

Eĉ teknikaj eksperimentoj pri radiotelefonio estas ĝenataj de la lingva diverseco. Unu el la plej grandaj zorgoj de la eksperimentantoj estas la efektiviĝi bonaj „moduloj“. La eminenta inĝeniero, kiu sisteme direktadis la unuajn eksperimentojn pri radiotelefonio, ĉe la Eiffel-turo, iam petis min, ke mi aŭskultu la fremdajn staciojn, por kompare raporti al li pri la pli malpli bona kvalito de ilia modulo. Mi povis nur respondi: „Ion tute neblan vi petas de mi, ĉar, eĉ kiam vivanta Anglo apud mi parolas Angle, lia „modulo“ ŝajnas al mi tute malfarita“. Por esti kapabla ĵuĝi teknike pri la kvalito de fremdlingva radiotelefonio transsendo, estas nepre necese

faru nesingardajn, kvankam bonintencajn, klopodojn; ili nepre lasu al la francaj le zorgon labori (metode labori) por tiu nulo.

Tiu nuligo dependas ekskluzive de la ministro pri Publika Instruado, nun s-o François Albert. S-o Albert nun havas multajn aliajn pli gravajn zorgojn por korekti diversajn malbonefikajn decidojn de lia antaŭulo, kaj ni devas iom pacienci. Sialianke la francaj esperantistoj tre atentis, ke tiu ministra decido favora al Esperanto ne ligu nian movadon kun iu ajn politika partio; ĉar, se poste venus alia partio al registaro, ni povus timi la nuligon de tiu favora decido.

L. Poncet, Lyon.

## Novaj favoraj rezolucioj por Esperanto!

### Unua Brazila Kongreso de Kontoscienca.

La Unua Brazila Kongreso de Kontoscienca, okazinta en Rio de Janeiro dum la monato aŭgusto, aprobis unuanime la jenan rezolucion prezentitan de D-o Carlos Domingues: „Devas esti enmetita en komercajn kursojn la instruado de la internacia lingvo Esperanto, kiel helpa mondlingvo“, la sola efika solvo de la grava problemo de la internacia kompreno.

La raportinto estis D-o Figueira de Mello, vicdirektoro de Komerca Akademio en Rio de Janeiro.

A. Couto Fernandez, Rio de Janeiro.

### Monda Institucio de Nepersona Viveco, Mexico D. F.

En Meksikurbo (Mexico D. F.) filozofoj kaj teozofoj ĵus fondis „Institucion Mundial de la Vida Impersonal“. En artikolo 6 de ĝia statuto ĝi akceptis jenan decidon: „La Asocio elektas Esperanton kiel oficialan helpan lingvon de la institucio; ties lerno estas deviga por instruistoj kaj por la direktanta grupo.“

### Esperanto ĉe la poŝto en Estonio.

Dank' al siatempa peticio de llepto, rekomendanta la akcepton de Esp., almenaŭ provizoran, apud la franca kaj angla lingvoj en la internacia kaj ĝiĉeta servoj de la Poŝto kaj Telegrafo, la Poŝt- kaj Telegraf-administracio de Estonio interkonsentinte kun la Trafikministerio decidis iaŭbele translokigi la esp. parolantajn oficejojn je oficoj, kie oni havas okazojn intertrakti kun la publika, parolanta fremdajn lingvojn.

Nun, konforme al tiu decido, en Estonio, almenaŭ en la ĉefaj poŝta kaj telegrafa oficejoj en Tallinn (Reval) ĉe paro da ĝiĉetoj troviĝas inform-oficejoj en tri lingvoj: estona, franca kaj esperanta kun la surskribo: „Tie ĉi Esperanto estas parolata.“

Estas notinde, ke la kompreno de l' esperanta teksto de l' peticio kaj la por nia movado favora decido okazis sen ia perado de lokaj esperantistoj.

### III. Ĝenerala Kongreso de la Hebrea-Skolitista Asocio.

Tiu asocio kiu havas ĉirkaŭ 4000 membrojn en 36 polaj urboj kaj filiojn en Latvio, Rumanujo, Bulgarujo, Palestino k. a. akceptis dum sia kon-

greso en Warszawa (25-28. 8. 24) unuvoĉe la jenajn rezoluciojn:

- 1) Ke en intertraktado kun la eksterlanda ne-hebrea skolitaro oni uzu la lingvon internacian Esperanton kaj
- 2) Ke en Internacia Korespond- kaj Interŝang-klubo estu la oficialaj lingvoj: hebrea kaj Esperanto.

Koresponda Faktejo, trupestro kaj del. de UEA en Sieradz, Polujo, Józef Szułman.

(Esp. kaj naciaj skolitistaj gazetoj bonvolu kiel eble plej multe publikigi tion ĉi kaj sendi unu ekzempleron al la subskribinto, kiu ankaŭ donas adresojn de polaj skolitoj al ĉiuj eksterlandaj skolitoj).

## Radio.

### Represo en nacilingvaj radio-gazetoj nepre rekomendata!

#### Brazilo.

La 9 aŭgusto, en la sendstacio Praia Vermelha (S. P. E.), de la Nacia Telegrafo, s-o ing. Luiz Porto Carneiro Netto komencis kurson de Esperanto, kiu estas bone akceptita de la radio-amatoroj.

Kelkajn tagojn poste tiu sama stacio disaŭdigis la esp. kanton „En nia lando“ kantitan de s-o D-o Luiz Lima Vianna.

La revuo „Radio“, oficiala organo de la „Radio Societo de Rio de Janeiro“, publikigis la tutan paroladon pri Esperanto faritan de D-o E. Backheuser je la 20 junio.

A. C. F.

#### Meksiko.

La meksikaj samideanoj nun sukcesis varbi duan stacion por Esperanto.

La 31 julio s-o Jesus Amaya, konata kiel kunlaborinto de „Argus“, la interesa organo de meksikaj esperantistoj, paroladis de la radiostacio de la kompanio „El buen tono“ en Mexico D. F. pri Esperanto kaj pri helpo al blinduloj.

Antaŭvideble post ne longe oni donos radiolacionojn de iu stacio de Meksikurbo.

#### Madrid.

S-o Majoro Mangada Rosenörn interkonsentis kun „Radio Iberia“ la organizadon de disaŭdigoj kaj de Esperanto kurso por radiotelefono. La unua parolado okazis la 3 septembro je la 11,5 h. nokte pri „Impresoj de radiista vojaĝo“. La malbonaj atmosferaj cirkonstancoj malpermesis aŭdi tute klare la dissendon en kelkaj urboj, sed precipe en kelkaj andaluziaj urboj oni aŭskultis ĝin tre bone.

La gazeto „Radio Ciencia Popular“, favora al Esperanto, plene raportis pri tiu parolado.

### Hungara Radio Revuo uzas Esperanton!

Multaj esperantistoj ankoraŭ ne scias, ke la sola hungara radio-gazeto „Magyar Radio Ujság“ aperanta en Budepest jam de majo, de sia unua numero aperas ankaŭ sub esperanta titolo: Hungara Radio Revuo kaj raportas ne nur pri ĉiu sukceso de Esperanto, sed ankaŭ enhavas konstantan rubrikon malgrandan: Por Eksterlando kun resume de la enhavo kaj kun notoj pri lastaj okazintaĵoj. Estus dezirinde, ke multaj

Britujo, Rusujo, Svisujo, Ĉeĥoslovakujo, ktp. jam uzis Esperanton por siaj dissendoj. Interalie, la „British Broadcasting Company“ radiotelefonis en Esperanto samtempe per ĉiuj siaj stacioj la malferman paroladon de lia Moŝto la Reĝo de Britujo en la Imperia Ekspozicio en Wembley. Radio-parolado dissendita de la stacio WOR en New York estis tute klare aŭdita kaj komprenita en Japanujo, trans la tuta Usona kontinento kaj la Pacifika Ocano. La gazeto „Radio News“, unu el la plej disvastigitaj en Usono, akceptis Esperanton, kaj la grava Asocio „The American Radio Relay League“ oficiale decidis rekomendi Esperanton, kiel lingvon internacian de la „Internacia Amatora Radio-Unio“.

Sub la nomo „Internacia Radio Asocio“ fondiĝis la 1an de januaro 1924 internacia asocio, kiu en la daŭro de nur kelkaj monatoj akiris membrojn jam en 26 diversaj landoj kaj havas nacian sekretariaton en Britujo, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Francujo, Hispanujo, Nederlando, Irlando, Italujo, Jugoslavujo, Kanado, Usono.

Ĝia celo estas forigi per Esperanto la malfacilaĵojn renkontatajn en radio-komunikado pro la diverseco de lingvoj kaj intertrakti la diversnacian radioistojn, ĉe se ili ĝis nun ne lernis Esperanton. Ĝi ankaŭ intencas eldoni nun en Esperanto radio-gazeton nome „Internacia Radio Revuo“, per kiu, sen lerno de diversaj fremdaj lingvoj, la radio-teknistoj povos facile sciigi pri fremdaj laboroj, kaj la amatoroj povos legi artikolojn verkitaĵojn de ĉiulandaj samcelanoj. Tion ili atingos per tre facile, nur kelk-semajna lernado de Esperanto kaj ili certe ne bedaŭros la malmulton da tempo kaj penado, kiun ili dediĉos al studado de la lingvo internacia. D-o Pierre Corret.

### La praktika utileco de Esperanto en la informa servo.

Evidentaĵo pruvon pri la grandaj avantaĝoj de la uzo de Esperanto donas jena fakio, pri kiu afable atentigis ni s-o D-o Wullen, prezidanto de la grupo de Bochum, Vestfalio.

En la konata grava ilustrita revuo germana „Die Woche“ (La Semajno) en n-ro 35 de 16. 8. aperis artikolo pri „Amerikaj trovaj en la dezerto Gobi“. Jam en decembro pasinta, en ET 170, nia gazeto raportis resume pri tiuj trovaj laŭ ruzaj informoj de nia konstanta korespondanto en Siberio s-o H. Frank, Kazan.

El tiu ĉi fakio montriĝas klare, kiom pli rapidaj estas la rektaj radioj esperantistaj por nure lingva kaŭzo. La fakio estas de pli atendiĝa, ĉar temas pri granda revuo, posedanta ĉiujn modernajn rilatojn de la internacia gazetaro.

esperantistoj-radiistoj sendus el sia regiono interesajn radio-sciigojn al tiu gazeto pruvante la utilon de Esperanto en radiosfero kaj kelkaj mendus ekzemplerojn por propagandaj per ĝi Esperanton. Ĉar efektive la hungarlingvan gazeton neniu komprenas en la tuta mondo, ĝi do montras la necesegon de Esperanto por tiaj fakrevuoj. La eldonejo kaj redakcio korespondas kun eksterlando en Esperanto! Adreso: Budapeŝt, VIII., József-körút 5.

### Oficiala Interŝtata Radio-Konferenco kunvokita de L. d. N.

Radio-interesatoj memoros pri la deziresprimo de la Internacia Radio-Konferenco en Genève, Paskon 1924, koncerne la modifon de la konvencio de London. Ni raportis pri tiu ĉi detalo en ET 191 sub Deziresprimo I.

La gazetaro nun sciigas, ke la Dua Komisiono (Teknika Sekcio) akceptis rezolucion, kiu adresas al la Konsilantaro la peton, sen plua perdo da tempo kunvoki Internacian Radio-Konferencon por revizio de la konvencio de London 1912.

La gazetara servo de la Germana Ido-Federacio antaŭ ne longe disvastigis la falsan informon, ke la Internacia Radio-Konferenco de Genève ne estis aŭtoritata reprezentado de la radio-interesatoj de ĉiuj landoj kaj nur havis privatan karakteron.

La oficiala sinokupo de L. d. N., kiu konsideras la necesan revizion de la konvencio de London, aluditan en la deziresprimo de la konferenco, pravas pli ol io ajn, kiom kompetenta estis la nomita konferenco, kiu ne sole prilaktis la enkondukon de Esperanto en radio-telefonio. R. Kr.

## Pli da seriozeco!

Ĉiu samideano scias, ke la nombro de seriozaj, perfektaj esperantistoj estas malgranda. Kio estas la kaŭzo? Ekzistas certe diversaj kaŭzoj; senkulpigindaj kaj ne-senkulpigindaj. Kelkiu profesie estas tro okupata kaj pro tio ne havas tempon por serioza laborado aŭ por vizitado de grupkunvenoj. Al aliaj la ekonomiaj cirkonstancoj ne permesas, elspezi monon por libroj, gazetoj, tramo ktp. Sed kun granda certeco oni povas aserti, ke tre multaj ne havas la sufiĉe fortan volon. Kie estas volo, tie ankaŭ estas vojo! Nia movado urĝe bezonas seriozulojn, kiuj majstras la lingvon! Superrigardante la tutmondan Esperanto-movadon, kia ĝi nun estas, oni ricevas jenan bildon: Ĉie, kie montras sin tiel nomata Esperanto-movado, ĝi estas en la manoj de unu aŭ kelkaj laboremuloj kaj seriozuloj, ĉiel klopdantaj, instigi kiel eble plej multe da homoj al lernado de Esperanto. Oni ja ne povas diri, ke iliaj klopodoj estas sensukcesaj; ĉar ĉie, kie laboras tiaj seriozaj esperantistoj, de tempo al tempo kursoj estas malfermataj, per kiuj oni celas, alkonduki al nia movado novajn anojn. Sed preskaŭ nenie kaj neniam la finsukceso estas konforma al la oferta penado, ne kalkulite, ke multaj kursanoj ne finvizitas la kursojn; ankaŭ el tiuj, kiuj tion faras, nur tre malmultaj restas fidelaj al nia movado. Pro tio la nombro de seriozaj, perfektaj esperantistoj estas timige malgranda. Sed la Esperanto-movado estas serioza afero, kaj serioza afero bezonas seriozulojn. Tial estu permesate al mi, alvoki al la tutmonda esperantistaro: Pli da seriozeco! Ĉiu serioza esperantisto certe konsentos, se mi diras, ke ni devas laboradi per ĉiuj fortoj, se ni volas, ke nia movado progresu. Sed ne sufiĉas, ke laboras nur kelkaj, ne, ĉiuj devas labori serioze, persiste kaj celkonscie; ĉiu laŭ sia povo kaj je sia parto. „Maro estas gutaro!“ kaj tiel ankaŭ en la Esperanto-movado ĉiu sukceso, eĉ la plej granda, konsistas el kelkaj, ofte eĉ multaj sukcesetoj. Se ĉiu el ni ankaŭ nur havas etan sukceson, ni ĉiuj kune do atingas multon! — Do, estu seriozaj kaj perfektaj esperantistoj kaj ago serioze, senlace, persiste kaj celkonscie! Tiukaze la estonto estos nia kaj ni atingos la celon en glorio!

Heino Heitmüller, Bremen 9.

## SAT-Kongreso en Bruxelles.

### Korekto.

La sekretario de la Sat-Kongreso s-o A. van Aelst en Bruxelles scigis nin, ke en la kongresa raporto ne parolis s-o Gervois, kiel erare presite, sed s-o Gérard, sekretario de la Sekcio Bruxelles de Internacio de Eks-Militintoj kaj parolinto por la nomita Internacio.

Detala protokolo troviĝos en „Sennacieca Revuo“.

## Esperanto ĉe la Ligo de Nacioj.

(Komparu ankoraŭ nian defarikon sur pg. 1.)

Antaŭ fino de l' redaktado ni ricevis ankoraŭ leteron el Genève kun jenaj detaloj:

„Estas konstataĵe, ke la delegitaro franca sin detenis komplete de partopreno en la diskutoj kaj voĉdono, dum la britaj partoprintoj penis, sed ne sukcesis malfortigi la rezolucion de la komisiono.“

## Alvoko

### al ĉiulandaj kuracistoj kaj medicin- studantoj.

Ni insiste petas vin energie propagandi por la „Teko“. Ne ekzistu en la mondo iu ajn kuracisto aŭ medicinsudanto, ne apartenanta al la „Tutmonda Esperanta Kuracista Asocio“. Subtenu laŭ via ebla ĝin per libera laŭpova sendado de mono de tempo al tempo, por ke ni povu ekkomenci la necesajn aranĝojn, la antaŭmilitan vivon, kaj disvolvigadi. Sendu al ni vian propran aligon kaj la adresojn de ĉiuj konataj de vi kuracistoj kaj medicinsudantoj. Sendepende, sen nia perado, instigu ilin al aliĝo kaj laboro por la Teko. Pripensadu ofte pri sekvantaj demandoj: 1) Kion mi mem faru por la Teko? 2) Kiom da mono kaj kiom ofte mi mem povas sendadi por restarigo kaj subtenado de la Teko? 3) Kiom da novaj anoj mi povus varbi por la Teko? 4) Kiamaniere kaj kiel ofte mi interrilatiĝu kun aliaj Tekanoj? 5) Kiamaniere kaj kiom ofte mi interrilatiĝu kun la T. E. K. A. de Briquet (Lille) kaj kun la „Internacia Medicina Revuo“ de Mézei (Budapest)? 6) Kiomfoje mi skribu aŭ traduku medicinajn verkojn, artikolojn aŭ referatojn? 7) Kiamaniere mi per miaj propraj fortoj aŭ iniciato ebligu aŭ plifaciligu la eldonadon de medicinaj verkoj, artikoloj, vortaro aŭ aliaj eldonaĵoj? Ĉu per propra laboro ĉu per mombutendado? Ne temas nur pri plendoj, kritiko, proponoj aŭ konsiloj — sed samtempe ankaŭ pri la propra sendependa efektiva agmaniero. Pripensadu ĝin laŭ la principoj: „Viribus unitis“ kaj „Nulla dies sine linea“!

Aliĝojn, adresojn de kuracistoj kaj studentoj, demandojn kaj proponojn sendu (legeble skribitajn) al adreso de: D-o Maksimiliano Blassberg — Kraków (Pollando) — Starowisłna 18 aŭ D-o Milan Crlenjak — Zagreb (Jugoslavio) — Palmotić ul. 20/l. La mondonacojn (plej bone en naciaj monbiletoj) sendu al: D-o Sos — Wien I (Aŭstrio) — Tuchlauben 18.

## Alla grafikistoj ĉiulandaj!

Karaj samideanoj kaj samprofesiaj!  
En fino de oktobro estos aranĝata en mia urbo grafika ekspozicio. Kiel anulo de la komitato oni komisiis min aranĝi la eksterlandan fakon, intencante ĉe tiu okazo konvinkiĝi pri la utileco de Esperanto. Por tiu celo mi bezonas ĉiulandajn gazetojn, speciale la titolpaĝojn. Mia deziro estas, aranĝi la ekspozicion kiel eble plej komplete kaj per tio montri al la skeptikuloj, kion oni povas atingi nur per Esperanto. Ĉiu el vi certe posedas kelkajn malnovajn gazetojn kiuj por vi estas tute senutilaj. Vi multe helpos al la progresivo de Esperanto en lando, kie ĝi por multaj kaŭzoj disvastiĝas tre malrapide, sendante al mi kelkajn gazetojn. Al ĉiu sendinto mi dankos per karto kun ilustraĵo de mia lando. Kun via helpo mi multe povos fari; mi ne hezitos anonci stampe pri la atingita sukceso. Mi do turnas min kun varma peto al ĉiuj samideanoj kaj precipe samprofesiaj, ke ili subtenu mian entreprenon por bono de nia komuna afero.

Mieki Wladyslaw, str. Siaszyca 25, Poznań Polujo.

## La Deksesa. \*)

(Daŭrigo.)

### La salto el la fenestro.

Kial mi volas memmortigi mian. — La salto el la fenestro en la tria etaĝo. — Rememoroj. Elveturo el Gruz.

La Deksesa finiĝis jam antaŭ kvar semajnoj, kaj ankoraŭ mia raportoj portas la titolon „La Deksesa“. Eble tio fidas vin, kara leganto. Sed pacienciĝu ankoraŭ iomete; mia raportoj estas finĝonta, ĉar mi estas memmortigonta mian. Italujo estas la kaŭzo.

Jes, tion mi ne plu ellenas. Ĉiuj homoj ĉi tie — la fiakristoj, la pakajportistoj, la gvidistoj, la vendistoj de ilustritaj kartoj, de albumoj, de koraloj, de konkoj, de rememoraĵoj el vera imitita bronzo, la botpurigistoj, la almozuloj, la restoraciestroj, la cigaredo-ofertistinoj — ĉiuj, escepte la esperantistoj, ŝajnas esti konspirantaj por nudigi min, nudigi en la reala senco de l' vorto.

Do, vi povas kompreni, kial mi pensas pri sinmortigo.  
Mi staras antaŭ la malfermita fenestro de mia hotelĉambro en la tria etaĝo kaj rigardas mal-supren al la jam vigla vivo sur la stacia placo de Napoli.

Estas frua mateno. En malproksimo mi vidas la silueton de vulkano Vesuvio, nubo ŝvebas super ĝi.

Volonte mi elirus promeni. Sed mi ne povas. Mi estas tute nudigita. La sola objekto, kiu restis al mi, estas ĉemizo. La homoj ridus pri mi, la polico tuj arestus min, kaj tian honton mi ne povus toleri.

\*) En la pasinta numero estas erare nepresita la titolo „La Deksesa“; oni legis la daŭrigojn sub „Dubrovnik (Ragusa)“.

Ĉu restas al mi la alia konsekvenco ol salto el la fenestro por frakasi mian bedaŭrindan korpon sur la pavimo de la stacia placo?

Mi pretigas min, ekkuras, saltas kapantaŭe tra la fenestro — hej, tio ĉi estas majstra salto por sporta ĉampiono, per kiu li certe gajnus mondrekordon kaj oran medalon — kaj jen mi estas faleganta en la profundajon.

Dum la falego mi rememoras ankoraŭfoje fulmrapide pri la okazintaĵoj de la ĵus pasintaj tagoj, depost kiam mi forlasis belan Dalmacion kaj ĝian altvaloran perlon — Dubrovnik.

\*

Kiel nevolonte mi forlasis ĉiun trunkvilan urbeton apud la Adriatika marbordo! Nur sep tagojn mi loĝis en ĝiaj muroj, kaj jam mi ekamis ĝin el kore kvazaŭ malnovan konaton. Tiel malgranda ĝi estas kompare al tiuj urboj, kiujn mi intencas nun viziti, kaj tiel malmulte konata ĝi estas kompare al tiuj majestaj nomoj: Napoli, Roma, Firenze, Venezia, Milano. Kaj tamen, aŭ eble ĝuste pro tio, pro tiu malgrandeco, pro tiu relativa nekonateco ĝi plaĉis al mi des pli bone. Kuŝante sur deklivo de monto Srgi kaj rigardante mal-supren, oni opinias, ke oni povus preni la urbeton en siajn brakojn, same kiel ĝin ĉirkaŭprenas la murego. Kaj interne de la muregoj tiu idilia vivado de kontenta popolo!

Jes, Dubrovnik, vi gajnis mian koron rapide; tuta Dalmacio ĝin gajnis. Malgraŭ la sento de soleco en la lastaj tagoj mi amis vin, eble eĉ tiom pli, ĉar via infima ĉarmo estis kvazaŭ animo, al kiu mi povis alkrutiĝi min, dum aliaj animoj al mi mankis.

Nun la ŝipo jam forportas min al Italujo. Starante sur la ferdeko, mi rezultas la dalmacian teron.

Vespero venis per malluĝitaj paŝoj desupre. Nia ŝipo — estas granda vaporulo „Lovrienac“, sed nur kelkaj pasaĝeroj veturas per ĝi — serĉas sian vojon el la haveno, lumigante la bordojn per lumjetilo. Multaj rem-kaj velboatoj aperas en ĝia brilstrio, kaj kelka amanta pareto estas malkovrata per la akra okulo de la lumjetilo.

Ni eliras la havenon. La lumoj de Gruz malaperas post duoninsulo Lapid; poste la konturoj de Lapid miksiĝas kun la horizonto. Oni ekvidas la lumojn de Dubrovnik. Longtempe ili restas videblaj.

Antaŭ ni aperas verda lumeto. Krioj aŭdiĝas. Kio okazas? Nia ŝipo sonigas la sirenon. Maldekstre, dense apud ni, aperas kuro. Ĝi ne atentis nin. Preskaŭ ĝi reverstiĝis.

En malproksimo fulmas. Sed super ni la firmamento ankoraŭ estas klara. Nur malgranda nubeto pendas en nordo. Eble ni havos fulmotondron kaj ventegon dum la nokto.

Fine ankaŭ la lumoj de Dubrovnik dronas post la horizonto. Estas preskaŭ la deka horo. Jam oni vidas nur maron kaj ĉielon, kovritan per steloj, kies plej brilaj estas reflektataj de la ondoj.

En nordokcidento staris antaŭ kelkaj horoj la maldika duoncirklo de l' nove pleniĝonta luno. Ĝi jam malaperis. Kiam mi estos en Venezia, ĝi estos plena. Jam nun mi ĝojas pri tiu plenluno en la reĝina urbo de Adriatiko, kiun pri-kantis jam tiom da poetoj kaj pentristoj tiom da majstroj de koloro. Tiu ĝoiga sento sukcesas eĉ forpeli la malĝojon pri la adiaŭo de Dalmacio, kaj kun ĝi mi kuŝigas min sur la provizoran liton en la kajuto.

### La salto daŭras kaj finiĝas.

„Neppund Wurzen“. — Kiamaniere oni nudigas min. — Baleno kaj krokodilo anstataŭ supo, kaj aliaj interesaj aferoj. — Fraŭlino, kiu vendas tute specialan specon de cigaredoj. Mi atingas la pavimon.

Antaŭ nelonge mi legis en viena ĵurnalo artikolon pri „Nepp und Wurzen“, en kiu estis skribite kvazaŭ pri io memkomprenebla, ke fremdulon oni provas superuzi kiel ajn kaj ke estas eĉ speciala plezuro por vojaĝanto lasi sin „nepi“, t. e. lasi al si forpreni la monon ĉiukaze kaj ĉiamaniere.

Certe la skribinto de tiu ĉi artikolo estas miliardulo. Mi preferas pagi la ordinarajn prezojn anstataŭ esti „nepata“, kaj estis rigardata kiel simpla homo anstataŭ kiel „Wurzen“, t. e. homo „nepota“.

Bedaŭrinde dum miaj unuaj tagoj en Italujo mi ne sukcesis en tio. La „nepuloj“ tuj ekkonis en mi la „Wurzen“, kaj ili fakte sukcesis „nepi“, t. e. tute nudigi min, eĉ tiom, ke mi nun flugfalas tra la aero kaj atendas, ke mia malfeliĉa kranto atingu la pavimon de la stacia placo en Napoli. — Tuj kiam mi eliris la ŝipon en Bari — estis nur la sesa horo matene — kvar-kvin homoj sin jetis sur min por ŝiri la kofron el mia mano. Mi protestis, kriis; sed tio nenion helpis. Du homaĉoj prenis la kofron, jetis ĝin en fiakron kaj postulis por tiu peneto sumon, por kiu oni povus aĉeti kompletan vestaĵon.

La fiakristoj, vidante ke mi disponas nur pri grandaj moneroj, nun ekdisputis pri tio, kiu el ili veturu min. Unu prenis min je manoj, alia je piedoj, kaj ĉiuj provis ŝiri min en sian fiakron.

Ho, mi mizerulo, oni preskaŭ elŝiris miajn brakojn kaj kruojn! Mi volis voki policanon;

sed kie oni policanojn bezonas, ili ne estas trov-eblaj, kaj ili svarmas, kie oni ne bezonas ilin.

Do, restis al mi nenio alia ebleco ol paciencie atendi, kiu de la fiakristoj estos la pli forta. Post duonhora interbatalo tio evidentigis, kaj fine mi povis komenci la veturado al la stadidomo. Infertempe la alia fiakro kun mia kofro jam malaperis.

La veturado iris sufiĉe malrapide kaj daŭris tre longe; sed, kiel ĉio, tiel ankaŭ mia veturado havis finon.

Mi elfiakrigis.

„Quanto costa?“<sup>1)</sup> mi demandis, kaj falis efektive sur mian dorson, aŭ pli ĝuste mia dorso falis sur la pavimon, kiam mi aŭdis la sumegon. Tutan modernan vilaon kun ĉia komforto kaj du privat-automobiloj oni povus ricevi por ĝi.

Mi pagis — vi scias, la kavalaro pagas kaj silentas, precipe kiam minacas pugno kaj polico — ano ne estas videbla.

Sed jen la alia fiakristo, kiu veturis mian kofron, aperas kaj postulas eĉ duoblan sumegon, ĉar „sinjoro tiel longe atendigis lin“. Mi ĝojis, ke entute li ne malaperis por ĉiam kun mia kofro, kiu entenis i. a. valorajn memorajojn, manuskriptojn kaj ankoraŭ nepagitan fakturon de mia taloro, kaj — pagis.

Denove tri-kvar portistoj sin jetis sur mian kofron por porti ĝin al la deponejo. Eh, mi kunportis sufiĉe grandan sumon da italaj liroj; sed kiam mi estis paginta al tiu portisto, kiu portis la kofron al la deponejo, restis al mi akurate nenio da liroj.

Do mi devas ŝanĝi. El Dalmacio mi posedas ankoraŭ kelkml dinarojn. Mi ŝanĝas — sed la ŝanĝisto ne povas kalkuli, aŭ mi ne povas ĝuste vidi. Por miaj kelkml dinaroj mi ricevas nur etan sumon da liroj. Tamen, dank' al Dio, almenaŭ iom da mono mi havas.

Poste mi veturis de Bari al Napoli. Sed kiam mi estis paginta la bileton, restis al mi denove nenio monero.

Kiam en Napoli mi forlasis la vagonon, tuj denove armeo da pakajportistoj atakis min.

Kion fari? Ne plu havante monon, mi devis promesi al la portisto mian alian vestaĵon, kiam mi havis kun mi por ne ĉiam aperi en la sama. Je angulo staras botpurigisto. Kiam mi preteriras, li kaptas min kaj devigas min meti mian piedon sur benketon.

Kiamaniere pagi lin? Mi donis al li mian alian ĉemizon kaj mian alian paron da ŝtrumpoj. Por mi ja sufiĉos unu.

Almozulo alvokas min. Mi donacas al li la kofron, ĉar — malpenigite — ĝi jam estas nebezona al mi. Sed pri tio li ŝajne ne estas kontenta, ĉar li murmuras ion kvazaŭ: „Avarulo!“

Hazarde kaj feliĉe mi trovis en iu intima poŝeto ankoraŭ kelkajn dolarojn, pri kiuj mi forgesis kaj kiujn mi nun tuj ŝanĝis. La mono sufiĉis por fari ekskurson al la blua groto sur insulo Capri, kie mi intencis preni kelkajn manplenajn da argento, kiam mi vidis en la simila groto sur Biŝevo. Sed bedaŭrinde en Capri mi havis malbonan lumon; pro tio la argento ne estis trov-ebla.

En Capri mi vizitis restoracion. Ĝi havas tre strangan nomon, duone germanan, duone fantazian: „Zum Affen Papepipo“. Tie mi tagmanĝis.

Jam ion ruzigite per la spertoj, mi demandis antaŭe la prezon, kaj kalkulis la reston de mia mono: ĝi akurate sufiĉos. Sed post la mango la restoraciestro postulis apartan pagon por la uzo de teleroj, kuleroj, forkoj, tranĉiloj, tuko ktp. kaj por diversaj aliaj aferoj. Dio, mi devis doni al li mian poŝhorloĝon, ĉar tian prezon mi ne estus supozinta!

Cetero mi ne ricevis fion, kion mi mendis. Mi mendis supon, kaj oni alportis — roŝitajn balenon kaj krokodilon, kaj la kelnero eĉ asertis kun tute trunkvila mieno, ke tion oni nomas en Italujo „supo“.

Reveninte al Napoli (feliĉe mi havis bileton por iro kaj reveno), tuj oni haltigis min.

„Kooŝe Se Koralle!“ oni kriis en mian viz-aĝon. „Kooŝe Se Koralle!“ (Aĉetu koralojn!)

Tio estis la dialekto parolata en la regiono de Köln, kvazaŭ oni flurus ne nur mian fremdecon, ne nur mia naciecon, sed eĉ la urbon, el kiu mi venas. Ili tre bone konas la homojn — tiuj mallaboremaj vagabondoj!

Mi devis aĉeti; mi devis, vi komprenas. Per kio pagi? Mi fordonis mian jakon. Sub la itala suno oni ne bezonas jakon, certe.

Tamen mi estis iom malĝaja. Mi pensis pri la belaj tagoj en Dalmacio, kie la „nepado“ ankoraŭ ne estas tiel kutima kiel ĉi tie en Italujo — la fremdulekspuatenmaldoradato. Kaj enpense mi restis staranta sur iu placo.

Subite sonas parolaj al mia orelo. Kion oni volas nun de mi?

„Tio estas la Placo Tia kaj Tia. Jen staras la monumento de nia gloro Tia kaj Tia, kiu en la tria jarcento antaŭ Kristo venkis la turkojn, kiuj sub sia grandviziero Mustafa Kemal Atilla Paŝa almiŝtis la potencan marubron Milanon.“

Kaj tuj poste: „Dieci lire, signore, prego!“<sup>2)</sup> — Por la klarigado.

1) Kiom kostas?

2) Dek lirojn, sinjoro, mi petas!

Mi pagis per miaj pantalonoj.  
Feliĉe vesperigis, kaj oni ne rimarkis, ke mi jam marŝas en nura ĉemizo. Tamen mi rapidis por atingi mian hotelon.

Sed kelkajn paŝojn antaŭe, ĝuste kiam mi volis iri ĉirkaŭ la lasta angulo, la dolĉa voĉo de iu fraŭlino atingas mian oreilon.

"Sinjoro, ĉu vi ne emas aĉeti cigaredojn?"  
Kaj, alproksimiĝinte, en la orelojn ŝi fluŝtras: "Estas cigaredoj de tute speciala speco!"

Jam mi posedas nur ĉemizon, nek monon nek ion ajn, per kio mi povus pagi por la tutspecialaj cigaredoj de la fraŭlino.

"Estu ili de kia ajn speco!" mi kriis koleriĝinte. "Iru al la diablo kun viaj cigaredoj!" Kaj forkuris, kion ajn rapide miaj piedoj povis porti min.

Kaj nun mi estas faleganta el la tria etaĝo kaj atinganta la pavimon.  
Italujo nudigis min. Italujo mortigis min.

Jen — mia kranio krevos.  
Mi jam kuŝas. Estis iom malagrabla kunpuŝiĝo kun la tero. Sed nenian gravan damaĝon mi sentas. Ĉu estas eble? Salti el tria etaĝo kaj resti nedefektita?

Mi ĉirkaŭrigardas. Tie estas pavimo, jes. Kaj mi estas veslita nur per ĉemizo. Kaj tie estas la stacio. — Ne, estas la lito, el kiu mi falis, fantaziante pri la aventurojn en la lastaj tagoj.

Hahahaha!  
Kara leganto, ĉu vi pardonas min pro tiu mistifiko?

Tamen, iom da vero estas en la ĉi-supre rakontitaj aventuroj, kvankam ili estas terure trograndigitaj. Ankaŭ italoj bonvolu ne koleriĝi pri tio!

En la unuaj momentoj, post kiam mi estis suririnta la italan teron, mi fakte bedaŭris, ke mi estas veninta al Italujo, kaj eĉ kelkajn tagojn poste mi ankoraŭ ne tute paciĝis kun la sperto de la unua tago.

Cetero mi konstatis, ke la tedoj des pli malpliĝis, ju pli mi venis norden. Aŭ ĉu intertempe mi kutimiĝis al ili? Aŭ ĉu la tedemuloj vidis, ke mi jam ne estas tia nespertulo, kia mi estis la unuan tagon?

Ĉiokaze nun, restinte dekon da tagoj en Italujo kaj transirinte la limon al Svisujo, mi devas konfesi, ke Italujo tamen donis al mi multe da ĝuo kaj plenan kontentigon: havenurbo Bari, interesa Napoli, antikva Roma, bela Firenze, trankvila fabela Venezia kaj brua moderna Milano — ĉi havis sian apartan ĉarmon.

Kaj nun mi volas rakonti laŭ kronologia sinsekvo la veran veron de miaj spertoj kaj impresoj en Italujo.

## Bari.

Alveno. — Trudemuloj.  
Homoj, kiuj bankrotos pro sia komplezemo.

La nokto dum la veturado trans Adriatikon restis trankvila. Nubeto foriris, fulmotondro ne eksplodis. Tamen mi dormis nur malmulte, ĉar la "zanzare" tro ĝenis min.

La "zanzare" estas speco de kuloj, kiuj estas tre oftaj en sudaj landoj, precipe en Italujo. Ili alflugas senbrue, kaj oni eksentas ilin nur post la piko.

Albordiĝinte kaj pasinte la kontrolon de pasporto kaj pakajo, mi estis tuj atakata de amaso da portistoj kaj fiakristoj. Pri tio mi jam skribis en la antaŭa ĉapitro, kaj, kvankam mi tie trograndigis, la trudemulo kaj postulemo de tiuj homoj sufiĉe afliktis min.

Poste mi speciale lernis kelkajn frazojn, kiuj eble povus definiĝi trotrudemulojn. — "Lasu min en paco!" — "Mi tute ne plu havas monon!" ktp. — Sed ĉu ili kredus al mi? Ĉar estas nekredible, ke en fremda lando oni vojaĝas sen mono. Mi spertis poste, ke plejbone estas, tute ne atenti tiujn homojn, de kiuj oni ne mem deziras servon, kun fiakristo antaŭe interkonsenti pri la prezo, al pakajportisto pagi, kion oni mem opinias konvena, kaj kiu vendisto de memorajoj ktp. marĉandi kaj interkonsenti eventuale je la duono de l' komence postulita prezo. Cetero estas konsilinde havigi al si plejbone baldaŭ malgrandajn monerojn, por ke oni ne estu devigata pagi bileton de kvin aŭ eĉ dek liroj por la plej malgranda servo; ĉar oni staras baldaŭ nuda kiel Adamo kaj devus mem almozpeti kiel la multaj almozuloj ĉi tie.

Tiom pri la homoj, kiuj volas profitaci je la nesperto de vojaĝantoj. Sed mi ne forgesu montri ankaŭ la alian flankon de la medalo.

Ekzistas ĉi tie ankaŭ homoj, kiuj ŝajne volas bankroti pro vi. Ĉar la sameđanoj de Bari, precipe Prof. D-o Lacalendola, la delegito de UEA, kaj D-o Sante Cosentino, la vicdelegito, estis vere tro komplezaj, tiel ke mi ne scias, kiamaniere rekompenĉi ilin.

Cetero mi intertempe rimarkis, ke la vivkostoj ĉi tie estas tute portebaj, kaj ke — se mi sukcesos savi min de tro multe da servemuloj etendantaj tuj sian manon por kontanta rekompenĉo — mi tamen revenos hejmen per tiu mono, kiu ankoraŭ restis al mi ĝis nun.

Kion diri pri Bari? Ĝi estas havenurbo kun ĉ. 140 000 loĝantoj, havas malnovan, novan kaj novegan kvartalojn — la du lastaj kun bonaj, rektaj stratoj kaj belaj placoj. La loĝejoj tamen

ne ŝajnas al mi tiel komfortaj kiel tiuj en la mez-eŭropaj grandurboj.

Diversajn palacojn, teatrojn ktp. mi rigardis de ekstere, kelkajn preĝejojn, ankaŭ interne; la plej antikva kaj interesa ŝajnas al mi tiu de S-ta Nikolao, kie nia s-ano pastro D-o Rotondo bonvolis montri al mi la plej grandajn vidindaĵojn, la trezorejojn kc.

Sur la stratoj mi rimarkis la kutiman grandurban vivon; sed en la interna urbo de Bari ne trafikas tramo — nur al antaŭurboj. Oni rimarkas multajn ĉarojn kun du altaj radoj, kiuj estas ofte surpentritaj per diversaj koloroj.

Mi forveturis la saman vesperon, merkredon la 3-an de septembro, per rekta vagono al Napoli.

Teo Jung.

## Zamenhof Monumento.

Kunveno de la Internacia Pormonumenta Komitato okazis en Vien dum la Deksesa. Ĉeestis la kunvenon: S-oj Warden, Prof. O. Bujvid, St. Essigman, Wiesenfeld kaj J. D. Applebaum. La Komitato aprobis la raporton de la Organiza Komitato al la Deksesa, kiu estis presita en la Kongres-Libro.

La Hon. Sekr. montris la rezolucion, kiun li intencis meti al la kongreso por aprobo rilatanta al dankesprimoj al la Pola Registaro. Tiun oni ankaŭ aprobis.

La Komitato diskutis kaj aprobis la sugeston de la Hon. Sekr. pri aranĝo de Ora Libro, en kiun oni enskribu ĉies nomon, kiu mondonacis al la Monumento. La libro restu provizore en la posedo de la Majstrovidvino kaj estu transdonota poste al la Esperantomuzeo aŭ arkivo oficiale aprobita de esperantistaro. S-o Warden sugestis ke oni presigu malgrandan libreton kiu estos kopio de ĉiu ora libro kaj vendota al la mondonacantoj por malgranda sumo. La komitato notis la sugeston por posta prikonsidero.

Oni pridiskutis la inaŭguron de la monumento kaj akceptis principe la decidon, ke estas konsilinde ne prokrasti tiun inaŭguron tro longtempe post kiam la monumento estas starigita, kaj ke la komitato aranĝu mem pri la oficialaj oratoroj ĉe la inaŭguro.

## La raporto de la Organiza Komitato antaŭ la Deksesa.

Ĉe la tria laborkunveno de la Kongreso, aŭgusto 13, la Hon. Sekr. submetis la rezolucion pri aprobo de la raporto, kiu estis presita en la kongres-libro. D-o Privat, kiu prezidis la kunvidon, esprimis dankojn al la Organiza Komitato por la laboro farita por la monumento kaj komplimentis la Hon. Sekr. por la ĝisnuna sukceso de la monokoleto. La Hon. Sekr. raportis pri la favora decido de la Pola Registaro, cedi al la peto de la Komitato pri enirigo de la monumento sen alpage dogana, kaj proponis la sekvantan rezolucion:

"La XVI-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Vien 1924, ĉe sia tria laborkunveno aŭdis kun plezuro pri la favora decido de la Pola Registaro, cedinta al la peto de la Organiza Komitato por starigo de monumento al D-o Ludoviko Zamenhof, la aŭtoro de Esperanto, enirigi la monumenton en Polujon sen iu doganpage. La Kongreso esprimas per ĉi-tiu rezolucio sian tulkoran dankon al la Pola Registaro por la citita favoro."

Oni akceptis la rezolucion per granda aklamado, ĉar tiu favora respondo de la Pola Registaro montras ne nur monan subtenon de sia flanko, sed ankaŭ moralan al nia movado.

La rezolucio estis transdonata al la Prezidanto de la Kongreso por traduko kaj transdono al la Pola Ambasadoro en Vien, ke li transsendu ĝin oficiale al la Pola Registaro.

La Hon. Sekr. raportis pri la progreso farita kun la skulpiado de la monumento, kaj sciigis ke ĝi estos enŝipigata je ĉirkaŭ la fino de septembro per transporto al Danzig kaj Warszawa; ankaŭ pri la decido aranĝi la oran libron, neniu rimarko estis farata de la anoj dum la diskuto, kio montris aprobon al ideo. Rilatante al la inaŭguro de la monumento post finiĝo, la prezidanto de la Kongreso D-o Privat faris kelkajn rimarkojn kaj esprimis la deziron, ke la Centra Komitato faru la aranĝojn pri tiu afero. Oni sugestis okazigon de Kunveno de la K. R. kaj samtempe inaŭguri la monumenton; tio donos la okazon havi en Warszawa bonan internacian reprezentantaron por tiu grava okazo. S-ino Zamenhof atentigis la Kongreson, ke pro la fortaj frostoj en tiu regiono, povas esti ke la monumento ne povos esti starigota tuj post ĝia alveno ĉe fino de la nuna jaro. Tio prokrastis la tutan aferon ĝis la fino de la somero. Post plua prikonsidero oni decidis, ke la Organiza Komitato kunagu kun la Centra Komitato kaj faru kune ĉiujn decidojn kaj aranĝojn pri la inaŭguro de la monumento kaj la oratoroj dum la inaŭguro. Pri tiu decido D-o Privat proponis rezolucion kiu estas akceptita jene:

"La Kongreso esprimas la deziron, ke la Monumento Komitato decidu pri la dato de la inaŭguro de l' monumento post interkonsiliĝo kun la oficiala institucio de la Esperanto-movado tiamaniere, ke la ceremonio okazu kun la plej diversacia delegitaro, kiu estos ebla laŭ la cirkonstancoj."

J. D. Applebaum, Hon. Sekr.

## Bibliografio.

La malŝparulo. Originala sorĉfabelo en tri aktoj de Ferd. Raimund. El la germana lingvo tradukita de Fr. Zwach. Prezo: 1,80 ormarkoj. Formato 15x19 cm. Perd. Hirt & Sohn, Esp-fako, Leipzig.

La L. K. K. de la XVI-a elektis ĉi tiun plej konatan verkon de la Wien-a aŭtoro kiel kongresdramon laŭ la karaktero de la gal-plena urbo de la XVI-a.

Do, la tradukinto, membro de la L. K. K., kolonelo Franz Zwach imitas bonege kaj en tre facilegebla esperanta stilo la ĉarmajn scenojn, kiuj restas neforgegeblaj al la partoprenantoj de la XVI-a, la impresojn estigitajn per tiu ĉi amuza festejtrajo, skizanta la Wien-an popolan animon, vivfreŝajn kaj vivvarmajn popolfigurojn, iliajn morojn kaj kutimojn, animajn karakterizaĵojn kaj virtutojn, iliajn malfortecojn kaj malkorektaĵojn — ĉiuj poezie nobilitaj. Entute: la vera popolteatraĵo sen trivialaj, pikaj, burleskaj aludoj.

Kelkaj lingvaj eraroj de la aŭtoro estas senkulpigindaj kaj forigindaj en dua eldono.

La Esperanto-eldonejo Hirt & Sohn en Leipzig eldonis la kolekton: "Internacia mondliteraturo" sub la gvidado de s-o Prof. D-o Dieterle. La dek volumoj de la unua serio estas aperintaj. Nun estas submetataj la unuaj volumoj de plej zorgo elektitaj verkoj de l' dua serio. Volumo XI—XII prezentas la japanan romanon:

Deklaracio de T. Ariŝima kun permeso de la aŭtoro tradukis T. Tooguu 1924, broŝ., 125 paĝoj, prezo 2 ormarkoj. Formato same kiel la aliaj 15x19 cm.

La unua granda japana verko esperantigita, aperinta en eŭropa eldonejo. T. Ariŝima estas fama pro siaj noveloj kaj dramoj. Pro tio liaj verkoj estas la plej legataj en Japanujo. Ĉerte ĉi tiu novelo "Deklaracio" estas interesa por ĉiu esperantisto, ĉar ĝi montras, kiel la japana junularo sentas, pensas, vivas kaj suferas.

La esperanta traduko estas perfekte kaj bonstila sen iuj specialaj neologismoj. Oni devas danki al nia japana sameđano Tooguu, ke li ebligis ĝui al la timonda esperantistaro tiun ĉi faman verkon el la japana literaturo.

Volumo XIII enhavas:  
Poe, Edgar Allen: Ses noveloj el "Rakontoj de Mistero kaj Imago".

El la angla originalo tradukita de A. Frank Milward, 1924, 80 paĝoj. Prezo: 1,20 ormk. Enhavo: Ligēja Kelkaj vortoj kua mumio. La barelo de Amentlado. La ovala portreto. La homo, kiu troviĝas eluzita. La silento.

E. A. Poe, la eminentan, strangan genion en la angla-amerika poeziaro kun sia skeptika rido kaj profunda melankolio, ni konatiĝas per tiuj ĉi perfekte esperantigitaj ses noveloj. Ili ne perdis sian valoron kaj plastikajn kolorojn per la traduko, kiu montras, ke la eldonejo sekvas konscie la vojon de sia deklaro en "Literatura Informilo" n-o 1: "La tradukanto apartenu al la nacio de la aŭtoro, nur tiamaniere plena kompreno de la aŭtoro estos garantiata."

Volumo XIV prezentas:  
Balzac, Honoré de: La firmas de la kafo, kiu plikludas.

El la franca originalo tradukita de P. Benoit, 1924, 64 paĝoj. Prezo 1,20 ormarkoj.

Balzac, la kreinto de multnombraj verkoj, romanoj kaj noveloj, estis precipe la majstro de la plej kolorita medioskizo. Lia fantazia bildoriĉeco je sortoj kaj fataloj, je scenoj kaj mondsondo donis al li la gloron aparteni al la eminentularo de Francujo. Li estas la medietplena biografisto de la societo, li pritraktas ĝiajn ideojn, morojn kaj malvirojn kiel kritikisto aŭ senhonta cinikulo.

La generale tre bona traduko de Prof. Benoit donas bonan provon de la peza sed impresoriĉa stilo — kaj veran ĝuon, severe sekvan la konsilion, kiu la tradukisto sciigas en la antaŭparolo:

"Ni kredas hodiaŭ, ke la tradukanto devas malaperi malantaŭ sia aŭtoro kaj oni pelas kelkfoje ĝis ekstrema la zorgon pri laŭtira ĝusteco."

Kelkaj francismoj kaj neneceaj neologismoj ŝajnas forigindaj.

Volumo XV enhavas:  
Doroŝevič, Vlas: Orientaj fabeloj. El la rusa originalo tradukis kun permeso de la posedato de la eldonrajtoj Nikolao Hohlvo 1924 64 paĝoj. Prezo: 1,20 ormk. Enhavo: La fabelo pri fabulo. La kalifo kaj la krimulino. Kiel de Hasan falis la pantaloneo. La malĝuste trafitaj kalkanoj.

Nia zagreba sameđano donacas al ni per tiu ĉi bonega traduko la eblecon ĝui provon de rusa verkisto nuntempa kaj aŭtoro de multe legitaj libroj, kiu estis longjara redaktoro de la konata rusa gazeto Ruŝskoje Slovo (Rusa Vorto) en Moskva kaj mortis en 1921. La tradukita kvar fabeloj respegulas bone la lingvon de Doroŝevič akra, ĝusta, tre simpla kaj regula, sed samtempe moderna, forlmpresa, bela kaj poezia, kiel en antaŭparolo karakterizas ĝin mem la lena tradukinto.

Estas dezirinde, ke tiu ĉi dua serio de la Internacia Mondliteraturo estu baldaŭ elterpita. Tio kuragiĝos la eldonejon daŭrigi tiun laŭdinde kaj modele aranĝitan kolekton. Mi rekomendas al ĉiu esperantisto, ĉar ĝi plenumas du celojn atingindajn: per bona literaturo oni konkeras la animojn — per mondliteraturo oni venkas la naciajn kontraŭecojn.

Hans Dahmen, Horrem.

Pro Iŝtar. Romano el la antikva Babelo historio. Originale verkita Eldonejo Hirt & Sohn, Leipzig, Esperanto-Fako. 1924. 304 paĝoj. 14:20 cm. Bindita. 5,50 ormk.

Kiun gravan rolon ludis kaj ludas la religio — aŭ pli ĝuste la diversaj konfesoĵoj — en la historio de la popoloj! Per akreptinta grifelo la historiografo enskribis la emocigan sorton de grandaj regnoj en la grandan libron, sorton etvieblan, se la prudento estus venkinta religian fanatikecon. — Luyken atente legis en tiu libro kaj ĉerpis unu el la senombraj temoj abunde notitaj. — Same kiel en "La Faratono" la enhavo temas pri insida batalo de la pastroŝto kiu kontraŭ reĝoj ĉu kontraŭ alireligianoj. En "Pro Iŝtar" konspirado de idoleŝervantaj pastroj kontraŭ la anoj de la jehova-kulto en la lando Ue sekvigas dramon, en kiu ĉiuj homaj pasioj furioze interbatalas. Tri personoj konsistigas la kernon de l' temo: Omar, Lemuel kaj Zalmuna. Omar, medietma pezanimulo, lukianta kun kruela sorto, atakata de perfidaj fanatikuloj kaj fine pereanta pro amo kaj malamo de insida virinaĉo, Zalmuna. Lemuel, patriarka maljunulo, severa protektanto de sia religio kaj senindulga venganto de krimaj faroj. Zalmuna, ĉefastrino de la kulto de l' diino Iŝtar, pasie amas Omar' on, la hebreon, kiu ŝi ĉirkaŭvolvas ruzo per sia rolo kaj persekutas per inrigitaj diabloj. Ankaŭ ŝin ŝia amo fine mortigas, kiam ŝi vivo lasite disrompiĝas. — Vereco de la historia fono, maistreca karakterizado de la personoj kaj ĉagarteco kaj brileco de stilo kaj lingvo envidigas la romanon en la unuan rangon. Ĝi estas efektive unu el la plej bonaj kaj valoraj esperantaj originalromanoj, kiuj ĝis nun ekzistas. Ankaŭ en nacia literaturo la historia romano estas esence pli alte faksota ol rakonto el la fantazio maskita, kvankam tiu lasta ne malhavas ĉarmon kaj streĉecon. — Per originalaĵojn ni kreas vere propran literaturon, kiu kune kun la ceteraj flankoj de nia movado akcelas kaj subtenas nian lingvan kaj kulturan evoluon kiel potenca faktoro. — "Pro Iŝtar" apartenu al ĉiuj estu trovata en la librotrezoro de ĉiu esperantisto en la tuta mondo!

G. Ajul.

Ĝi estas havebla por 1.25 belg. fk. de Mechelen Aantrekkelijkheiden (Malines Attractions), Mechelen-Malines, Belgio.

Laboradomanieroj de la Klimatologio de D-o M. Topolansky, 8 pĝ. 26x185 cm.

Represo el Journal of Meteorological Society of Japan (35 year, p. 63-70) (organo de la Meteorologia Societo de Japanujo).

Ekzamenmetodoj pri la efikeco de kupokvarkinoj per enhaita inokulado ĉe kunliklo neperferke imunitiga de D o Hisao Kasai.

Represo el Scientific Reports from the Government Institute for Infection (Vol 1922) (Sciencaj raportoj de la Regna Instituto por Infektoj de Japanujo, en japana, germana kaj angla lingvoj) 6 pĝ. 26x185 cm.

La plej simpla metodo por serodiagnozo de sifiliso de D-o M. Murata. 5 artikoloj en Revuo por Dermatologio kaj Urologio, Tokio, 1-a ĝis 5-a raportoj. Po 10 pĝ. kun japanaj klarigoj.

La menciitaj publikigaĵoj pravas, kiom grava taksas japanoj la uzadon de Esperanto por sciencaj celoj. Ili povas esti modeloj por eŭropaj sciencistoj, kiuj ankoraŭ pli-malpli favore konsideras Esperanton, kredante, ke ili ne bezonas ĝin.

La publikigaĵoj estas valoraj propagandiloj inter universitataj rondoj.

Farmacio kaj Hemio n-o 1, Printempa numero, aperas ĉiusezone. 28.5 cm x 18 cm, 45 pĝ., aŭtografita sur japana papero, broŝ. Eldonis: Esperanto Grupo en Tojama Farmacia Kolegio, Tojama, Japanujo. Prezo po numero 30 senoj.

Jen denova aplikado de Esperanto por sciencaj celoj en periode aperanta sciencaj publikigaĵoj. Ĝi estas rekomendinda al ĉiuj sciencistoj. Rilata al la riĉa enhavo kaj la tipa japana arango ĝi meritis pleigrandan laŭdon. Zürich, gvidlibro, 12x18 cm, 16 pĝ. Belega ilustrita gvidlibro en bona Esperantosistilo havebla por 40 sv. ct. de s-ino Sing, Turnerstrasse 12, Zürich.

Spili, Marbano kaj klimata sanigejo, 11x25 cm, 10 pĝ., ilustrita.

Tre plaĉe presita gvidlibro en Esperanto, eldonita de Turista Oficejo de Spili (Dalmacio) okaze de la Dua Sudslava Esp. Kongreso. Interesatoj sin turnu al Turista Oficejo Spili.

Philatelie und Esperanto. Dupaĝa flugfolio, havebla de D-o Fr. Franke, München, Lindwurmstrasse 145/1. Informas bonege pri la utilo de Esperanto por filatelistoj.

Vivisekcio, dupaĝa flugfolio havebla de Esperantista Kolportista Asocio, 64, St. Thomas Rd. London N. 4.

Gazetaro.

Pro manko de loko ni de kelka tempo ne plu povis publikigi detalan liston pri la gazetoj enhavintaj notojn aŭ artikolojn en Esperanto.

Pro la ĉiam pligrandiĝanta nombro da artikoloj aktualaj ni ankau en estonigo povos apenaŭ disponigi la bezonatan lokon. La mencio tamen estas tre grava pro la statistiko. Ni do peias nian legataron estonte simple menciigi la koncernajn gazetojn laŭ nombro por represo kune kun notoj en nia rubriko "Kroniko". Se temas pri grandaj, gvidantaj gazetoj, aparta indiko de ĝi titolo rilata al gravaj artikoloj estas dezirinda.

Jen modelo: Depost (dato) ĝis (dato) aperis 55 notoj en 6 gazetoj, inter alie detala artikolo pri "Esperanto kaj la komerco" en "La Tago", (dato).

Depost 1 julio nia redakcio ricevis entute 160 gazetojn en 19 lingvoj kun artikoloj pri Esperanto; jen la detala listo: 68 en lingvo germana, inter kiuj 18 el Germanujo

- 28 Ĉeĥoslovakio
4 Francujo
4 Polujo
2 Svislando
2 Hungarujo
1 Usono

- 2 ĉeĥa
13 franca (3 el Belgio)
20 hispana (7 el Brazilo kaj Ĉilio)
4 itala
5 angla
8 japana
1 latina
2 kroata
7 pola
2 hungara
2 kataluna
5 sveda
2 rusa
4 holanda
10 flandra
6 jida
1 bulgara
2 greka

Esperanto-gazetoj.

Norvega Esperantisto, Kristiania, jan-junio. Estus dezirinde, ke tiu gazeto aperu pli ofte por tiel plifortigi la movadon en Norvegio.

Le Monde Esperantiste, Paris, marto-aprilo, majo-aŭgusto.

Pri la enhavo de ĉi tiu gazeto "Suda Kruco" diras (laŭ propra mencio de la redakcio): "Ĝi atakas ĉiujn kaj ĉion; oni povus eĉ kredi ĝin kontraŭ-esperanta". Ni subskribas ilon kaj ripetats fion, kion ni diras en ET 201. Al la dua respondo al ni en la gazeto ni respondas laŭene: Taktiko kaj lerta taktiko postulas, ke oni konsideru la rilaton de aliaj, same kiel oni pretendas la sian. Al la demando: Kiu rajtas postuli, ni diras: Ĉiuj esperantistoj, kiuj havas alian opinion kiel la izolitaj opozicistoj de L. M. E. kaj konsideras nur la progreson de nia movado, ne servante al iu persona intereso.

Belga Esperantisto, Antwerpen, marto-aprilo. Estas bedaŭrinda fakto, ke tiu ĉi gazeto aperas ĉiam malfrugite.

La Suda Kruco, Melbourne, junio julio

La Interligilo de l' PTT, Paris XVIII, junio.

La Revuo Orienta, Tokio, aprilo, majo, junio, julio.

Apartenas al la plej seriozaj gazetoj de nia movado. Ĝi ebligas bonegan informon pri la amplekso de nia movado en ekstrema Oriento. La enhavo estas modela kaj speciale interesa por neorientitaj.

La Espero, Stockholm, junio-julio.

Ke tiu ĉi gazeto ne jam aperas pli amplekse, pravas, ke la sveda movado ne jam estas suĉe forta. Aŭ ĉu temas simple pri organizaj mankoj?

Konkordo, Zagreb, majo, junio, julio.

Montraras ĝojigan frezkon en nia movado en Jugoslavio. Laŭ la siatempe publikigita programo oni tamen povus deziri ankoraŭ pli da pozitiva materialo en ĝi.

Esperantista Junularo, Leipzig-Möckern, junio.

Bulgara Esperantisto, Sofia, junio, julio, aŭgusto.

En junio-numero publikigas proponon pri fondo de komuna organo por balkan esperantistoj, inkl. Grekujo kaj Turkujo. La plano ŝajnas al ni ne valoro. Ĉefa celo de organo en Balkano kaj precipe en Grekujo, Turkujo,

kip, devus esti la propagando. Ĝi povas esti farata nur nacilingve. Ĉu balkanorgano povos esti fion ampleksa por kontentigi ĉiujn naciojn aligitajn? Por informi sin pri la internacia movado sendube sufiĉas la grandaj internaciaj gazetoj, nehavantaj tro da abonantoj.

La julio-aŭgusta numero enhavas legindan artikolon pri verkado de granda Esp. Bulgara Vortaro, kiun ankau ni plene aprobas. Se pro financaj kaŭzoj la vortaro ne jam povos aperi, tamen ŝajnas nepre necese, ke oni preparu la materialon por kolektiva laboro.

Litova Stelo, Kaunas, julio.

Enhavas legindajn artikolojn plejparte politikajn pri Litovio. En Esp. parto ĝi publikigas leterojn de Generalo Seber kaj de Prof. A. Dombrovski pri la organizoproblemo. Ŝajnas al ni necese esprimi kontraŭan opinion, post kiam la Plenkunsido de l' Deksesa, la sama aŭtoritato, kiu siatempe fondis la malnovan organon, definitive decidis kaj sankciis la novan organon laŭ la kontraŭo de Helsinki. Ni ne povas kredi, ke niaj viglaj samideanoj en Litovio deziras kontraŭstari la organizan progreson de nia movado.

La Progreso, Praha, julio.

Vegetarano, Hamburg-Fuhlsbüttel, julio.

Kataluna Esperantisto, Barcelona, aŭgusto, septembro, oktobro.

Post parta konsolidiĝo de la politikaj cirkonstancoj K. E. reaperas, kion fakton ni salutas. Nedubele estas, ke K. E. laŭ antaŭa, bone konata maniero senlace propagandos por nia afero inter kielalunoj

Movado, Helsinki, Finlando, julio.

International Language, London, julio, aŭgusto. Ke I. L. atingos sian celon, i. e. interesigi la anglan mondon pri Esperanto, ni tute ne dubas. La numero enhavas plezurigan karikaturon pri la prezidanto de B. E. A. s-o Merchant.

Libereco, organo de Sanko Esp. Grupo, Kioto, junio. Kun tre leginda japana enhavo.

Hebra Esperantisto, Tel Aviv (Palestino), julio. Hektografita informilo en esp. kaj hebra.

La Suno Hispana, Valencia, julio.

Medicina Heroldo, Strajica, Bulgarujo, n-o 1, julio.

Nova organo pereseranta pri sana instruo por la homaro entute. Redakcio: C. Georgiev, Strajica, Bulgarujo.

Holanda Esperantisto, Zutphen, n-o 25-57 (15. 9. 24).

British Esperantist, London, aŭgusto.

Arbeider Esperantist, Kristiania, aŭgusto.

Esperanto (IEA) Genève, julio, aŭgusto, septembro (kun aldono Buleteno de Internacia Labor-Oficejo) enhavas la oficialan raporton de l' Deksesa.

La Semisto, Sabadell, junio.

Sennacica Revuo, Paris, aŭgusto, septembro (kun Literatur-scienca aldono).

Advertisement for Eldonejo M. Tamverk, Esperanto-fako. Karja str. 5, Haapsalu, Estonio. Includes text about Kvin noveloj and Noveloj.

Advertisement for Nederlandaj Esperantistoj! Ne forgesu vian devon abon! landan Esperanto-gazeton. Holanda Esperantisto. Ĝi enhavas: Literaturon, Ekzercrubrikojn por komencantoj kaj progresintoj, Demandaron kaj ĉiujn ajn aktualaĵojn. Petu specimenon de la Administracio: (Esterlanden ni sendas nur post ricevo de 1 respondkupono.) Hazekamp 20 Zutphen.

Advertisement for Novaj tempoj. Gazeto de la esperantista instruistaro, propagandas novan pedagogion, perlaboran lernejon kaj per-edukan pacon. Petu specimenon de: M. Goldberg, Leipzig-Co. Klemmstr. 14.

Advertisement for Ĉiu interesato pri la japana movado kaj antaŭ ĉiu Orientano devas subteni la japanajn samideanojn kaj nepre aboni al La Revuo Orienta. Monata organo de la japana esperantistaro. Jarabono 7 sv. fk. Adreso: Japana Esperanto Instituto, Tokio, Uŝigome, Sin Ogaŭamaĉi III/14.

Advertisement for Nova Literatura 1924. Du romanoj, originale verkita: Jean Forge. Saltego trans jarmiloj. Bindita Gmk. 4.50. H. A. Luyken. Pro Iŝtar. Romano el la antikva Babela historio. Bindita Gmk. 5.50. Internacia Mondliterato: Vol. 6 Irving. El la skizlibro. El la angla originalo trad. H. L. Elvin. Kartonita Gmk. 1.20. Vol. 11-12 Ariŝima. Deklaracio. El la japana originalo trad. T. Tooguu. Kartonita Gmk. 2.-. Vol. 13 Poe. Ses noveloj. El la angla originalo trad. A. Frank Milward. Kartonita Gmk. 1.20. Vol. 14 Balzac. La firmao de la kafo, kiu pikludas. El la franca originalo trad. Paul Benoit. Kartonita Gmk. 1.20. Vol. 15 Doroŝevič. Orientaj fabeloj. El la rusa originalo trad. Nikolao Hohlov. Kartonita Gmk. 1.20. Raimund. La Malŝparulo. Sorĉfabelo en tri aktoj. El la germana originalo trad. Franz Zwach. La sukcesplena teatraĵo de la 16-a. Brŝurita Gmk. 1.80. 1 Gmk. (ormarko = \$ 0.24 aŭ sv. fk. or. 1.25). Ferdinand Hirt & Sohn, Esperanto-fako, Leipzig.

Advertisement for Internacia Esperanta Ludkartaro. Per ĉi tiu heraldike ornamita esp. propagandilo (12.2x6.9 cm) la plejmulto da kartludoj estas ludelaj. La ŝakludo estas ankaŭ aplikata! Postulu senpagan prezaron kaj specimenon! „IEL“ kartcentrejo Budapeŝt, Hungarujo. Poŝto 112, Kesto 11.

Advertisement for Anoncetoj. Anoncetoj pri esperantista vivo (naskiĝo, fianĉigo, edziĝo, morto, okaz-intaj gravaj esp. kunvenoj, festoj k. s.) senpage. Aliaj anoncetoj, nur akceptitaj por minimume du sinsekvaj enpresoj, kostas po du enpresoj kaj 20 vortoj (krom unu adreso) la prezon de ok ET-numeroj kontraŭ antaŭa pago. Abonantoj ĉe kiuj ni povas depreni la pagon de la abonkonto, ĝuas por propraj anoncetoj prezon de kvin ET-numeroj. Germanoj pagas 2.-mk., prefera prezo por poŝtabonantoj 1.25 mk. Anoncetoj devas alveni 13 tagojn antaŭ publikigo. LITOVAJ SAMIDEANOJ. Kiu scias pri la sorto de Waclaw Legowicz, loĝinta iam en Taŝkent, bonvolu sciigi al lia onklo laŭ adreso: Al Wicenty Bogdan, Kafanova 48 Taŝkent (Turkeŝtano). POLAJ SAMIDEANOJ. Kiu scias pri Antoni Piekarski, loĝinta ĝis mondmilito en Warszawa, bonvolu sciigi al lia nevo Lu dwik Ŝkuto, Kafanova 46, Taŝkent (Turkeŝtano). Korespondo kaj Interŝango. S-o Vinco Liŝdavyns, juna flo, ul. Wielka 12-1, Wilno, Polujo, volas korespondi kun samideanoj (precipe kun fraŭlinoj) pri la literaturo, geografio, vivo de l' lernantoj, pedagogiko kaj interŝanĝas PK kaj vidaĵoj. Ĉiuj malsanoj, ĝuste kaj ĝustatempe baltaj, kuraciĝas. Detaloj kun provosendaĵo por diversaj malsanoj 2 ormarkoj aŭ egalvaloro. S-ino Louis Seif, Prebunnallee 5/0, Regensburg (Germanujo). S-o Josef Hrabě, inspektoro, Palackého 61, Praha-Vinohrady, Ĉeĥoslovakio interŝanĝas PM kun iuta mondo. Respondos al ĉiuj kaj ĉiam senprokraste.